

Federacio Esperanto-Bretonio / Fédération Espéranto-Bretagne

Agadraporto 2018

Lokaj grupoj en

- Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Peumerit-Quintin, Lannion, Guingamp, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec.
- Finistère: Douarnenez, Landerneau, Querrien.
- Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo.
- Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.
- Loire-Atlantique : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu.

Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.

Membraro: oni observas daŭran malrapidan malkreskon de pluraj jaroj kun **155** membroj ĉi jare kun malmulte da novaj membroj, montrante ke plej multaj membroj estas « kernaj membroj » de la lokaj asocioj.

Agoj de la federacio

Eldono de la federacia bulteno *Verda Triskelo* (20-paĝa, 2 foje jare aŭtune kaj printempe), kun artikoloj proponitaj de la membroj de la diversaj lokaj kluboj, redaktoro: Jannick Huet.

Retejo: <http://bretonio.esperanto-france.org/> administrantoj: Bert Schumann kaj Xavier Godivier.

Reta diskutlisto de la membroj: bretonio@yahooogroupes.fr kun 280 abonantoj, ĉirkaŭ 200 mesaĝoj ene de 2018, administrata de kvar volontuloj.

Organizo de prelegturneoj

Du ĉefaj turneoj okazis dum 2018 en Bretonio.

Unua estis organizita de Josette Ducloyer por la FEB : Nijole Stakeniene, de Litovio, rondvojaĝis de la 3a de aprilo ĝis la 27a de aprilo en Montfort, Rennes, Pleugueneuc, St Malo, St Brieuc, Lannion, Douarnenez, Hennebont, Vannes, Sarzeau, Nantes, St Aignan, Grésillon, kun granda sukceso. Ŝi parolis pri Litovio kaj rilatoj kun Eŭropa Unio.

Dua prelegturneo estis organizita dum majo de Yves Nicolas por Esperanto-France : Normand kaj Zdravka de Kebekio estis en Nantes, Douarnenez, Plouezec, St-Malo kaj Rennes. Zdravka prelegis pri sia propra sperto kiel enmigrinto kaj Normand prezentis profesian analizon pri la rilato de la homaro kun la arbaroj.

Okazis ankaŭ vizito de Dennis Keefe en Vannes.

Rilatoj kun Esperanto-France, Josette Ducloyer reprezentas la FEB-on ĉe UFE, tri aliaj membroj de la federacio estas ankaŭ UFE-komitatanoj, du kiel reprezentantoj de membroj de UFE, kaj unu kiel reprezentanto de GEE.

Jara kunveno en Loudéac la 25an de marto 2018

43 ĉeestantoj, veno de ĵurnalisto de « Télégramme de Brest ».

- *Matena programo* : Post la laŭstatutaj devoj de la kunveno, pluraj intervenoj estas proponitaj pri « Kiel interesi novajn homojn al Esperanto » kun diversaj spertoj : funkciado de nova grupo en

Pluvigner, fino de la kursoj en Ensai de Lanion, daŭrigo de la kurso en Université de Lorient, kurso en mezlernejo de Guingamp kaj sperto pri Tap (temps d'activités péri-scolaires) en Sarzeau. Debato kaj teatra ludado por ekzerci pri Esperanto-informado al scivolemaj aŭ kritikemaj personoj.

- *Posttagmeza programo* : Kantoj de la koruso Interkant kaj teatraĵo prezentita de membroj de Esperanto-Vannes, kun la komedio « Amo ĉe la pordo ».

Agoj de la lokaj asocioj membroj de la federacio :

Kursoj de Esperanto : Kursoj kaj konversaciaj rondoj estas proponitaj en 15 urboj kaj vilaĝoj de nia regiono. Detaloj pri ĉiuj kursoj estas ĉiu-jare disdonitaj en la aŭtuna revuo de la federacio, Verda triskelo, VT45 por ĉi-jare, konsultebla en la ttt-ejo de la FEB.

Pli detala raporto pri la lokaj asocioj estos prezentita okaze de la venonta membrokunveno de la federacio en marto kaj konsultebla en la TTT-ejo de la federacio.